

# SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

December 1943

31 årg. Nr 12

ORGAN FÖR SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET

## *Esperanto-konferens i januari.*

### **Folken kring Östersjön. — Fredsproblem.**

Allt livligare bli diskussionerna om den kommande freden. En allmän förhoppning är dock den, att fredstiden skall baseras på en sådan grund, att människorna i de olika länderna komma att återfå sina mänskliga rättigheter: tanke-, tro- och yttrandefrihet. Dessutom har av många framförts det önskemålet, att framtiden må gestaltas så, att folken kunna komma i närmare och intimare kulturell kontakt med varandra än hittills.

Samtidigt som sådana synpunkter framföras, tycks man dock på sina håll vilja behandla de mindre folken såsom dockor, som man kan byta eller skänka bort efter behag. Detta gäller icke minst om oss, länderna kring Östersjön.

Det synes därför vara på tiden att samlas för att behandla dessa länders fredsproblem. Detta är orsaken till att inbjudan nu sker till denna konferens. Såsom föreläsare komma inga politiker att delta, ty konferensen har tagit som sin uppgift att låta just det komma till synes, som gemene man i de olika länderna hoppas och tror om framtiden.

Förutom prof. Björn Collinder, som talar om "Östersjöområdets språkfråga" och red. Sven Backlund, som behandlar ämnet "Östersjöländernas behov av ömsesidig hjälp", ha inbjudits ett antal representanter för våra grannfolk i öster. Rektor J. Vilkki från Somero i Finland har redan telegrafiskt lovat komma. Likaså medverkar Fru Alide Kuld-Leijder från Estland. Ing. Fred Turner från England kommer dessutom att redogöra för de principer, som ligga till grund för Atlantdeklarationen och dess inverkan på fredsproblemen. Event. kommer även någon representant för Lettland och Litauen att delta.

Prof. Collinders och red. Backlunds föredrag hållas på svenska, de övrigas på esperanto.

Konferensen äger rum den 5 och 6 jan. (trettondagshelgen) på Stockholms Högskola, Norrtullsgatan 2 i Stockholm. Deltagarna samlas kl. 5 em., och första föreläsning hålles kl. 6. Kl. 8 följer samkväm med te-supé. Trettondagen blir det olika föredrag från kl. 10

fm. Lunch mellan 12 och 2 em. Efter föredragen diskussion. Konferensavgiften, kr. 3:—, erlägges vid öppnandet.

Anmälan om deltagande i konferensen bör göras snarast, om möjligt före den 15 dec., för att underlätta förberedelsearbetet för konferensen. Tidig anmälan är särskilt viktig, om Ni önskar rum på hotell (pris omkr. 7 kr. pr natt) eller privat (ung. 3 kr.). Konferensens adress är **Esperanto, Tegelbacken, Stockholm.**

Vi räkna med att särskilt esperantisterna i Mellan-Sverige skola begagna detta tillfälle att dels samlas till ett vinterting, dels komma i intim kontakt med de fredsproblem, som ligga oss närmast. De inbjudna föreläsarna komma säkerligen att ge deltagarna mycket minnesrika dagar.

**Internacia Esperanto-Ligo. Svenska Esperanto-Förbundet**

/E. Malmgren.

/Paul Nylen.

Till konferensen ha redan anmält sig bl. a.:

Karl Söderberg, Uppsala; E. Bonander, Karlskoga; A. Björnemo, Kolsva; Stellan Engholm, Ludvika; Olga Engholm, Ludvika; Ges-oj Julin, Stockholm; T. Morariu, Stockholm; Fr. Szilágyi, Borås; Bernhard Eriksson, Stockholm, Einar Dahl, Uddevalla, Nils Johansson, Norrköping, Sven Ragnar, Norrköping, Jan Strönne, Malmö, och John Stenström, Ulricehamn.

## **Esperantobokens dag.**

Kommer en esperantotidning ut med ett decembernummer, då kan man däri alltid söka en redaktionell artikel om Bokens dag, underförstått Esperantobokens dag. Esperantisterna fira nämligen dr Zamenhofs födelsedag (den 15 dec.) genom att ägna en av sina sammankomster i julmånaden åt boken, åt esperantolitteraturen. Man låter någon boksynt medlem redogöra för årets bokflod



från esperantoförlagen, och man låter uppläsare föredra prov ur nyheter eller klassiska bokverk.

Det synes oss vara ett värdigt och vackert fira minnet av den man, som gav världen det saknade första hjälpmedlet till mellanfolklig förståelse, det fullfärdiga internationella språket.

Men detta firande av minnet har inte fått bli esperantisterna nog. De måste på minnesdagen också i handling visa, att de vilja fortsätta det av mästaren begynta verket. Ett språk är endast till, i den mån det användes, i tal och i skrift och i tryck, och på den högtidsdag vi nu tala om måste var och en eftertänka, i vad mån han eller hon kan medverka till, att esperantospråket lever de tryckta ordens liv, lever i bokens form. Esperantos bokflod måste flöda liksom alla språks litteratur, och var och en kan medverka till, att förlag och författare få de ekonomiska möjligheterna att tillse att så sker. För att visa, att man förstår sin plikt i detta hänseende, underlåter ingen esperantist att på Bokens dag köpa minst en esperantobok.

Denna vackra tradition är det esperantotidningarna en kär plikt att understödja, och dess läsekrets anser sig ha rätt att vänta, att tidningen ger den anvisningar på, vad som till den stora dagen finns att få på bokdisken. Tidningarna underlåta i intet nummer under året berätta om boknyheter, som komma till deras kännedom, och annonsspalterna ropa ut detsamma med typografiens alla röstresurser. Men i decembernumret vill läsekretsen ha en extra påminnelse om, vad som står att få, ty ingen vill bli befunden med att till Bokens dag ha glömt bort att skaffa sig en ny esperantobok.

Vår plikt att tala är alltså klar, men vi måste först bekänna att vi i år för första gången bävat inför denna plikt. Skulle det i år komma att finnas något nytt att bjuda ut? Skulle vi bli nödsakade bedja läsekretsen hålla sig till den äldre litteratur, som ännu kan finnas kvar på esperantoförlagets hyllor? Där finns en hel del och mycket av stort värde, men en tidningsman har nu sin lilla svaghet, att helst tala, när han har en nyhet att komma med. Vi leva i en orolig väntans tid. Man väntar med både det ena och det andra, och till och med esperantofolket, framtidens pionjärer, vänta. Bl. a. vänta de med att köpa böcker.

Detta sade vi oss med sorg och drogo den nära till hands liggande slutsatsen: om ingen köper, kan ingen våga trycka. Den situationen artade sig visserligen att bli en nyhet till decembernumret, men inte en sådan som det är roligt att meddela. Vi misskände emellertid de svenska esperantisterna, ty vad det led fram på året började de att så smått fråga efter litteratur igen, och hos förlag och författare vaknade nytt hopp. Utifrån kontinenten har bokhandeln intet att erbjuda, och skälen härtill äro tyvärr alltför uppenbara. Årets nyheter måste komma från de svenska pressarna, och omständigheterna måste säga oss, att även därifrån kan inte esperantisterna ha mycket att vänta.

Nej, kvantitativt kan det inte bli mycket, men dessbättre kan en bok ha både inre och yttre värde utan att ha tegelstenstyngd. Och den reflexionen gör man med glädje, då man i sin hand väger den lilla kollektion esperantotryck, som vi ha att anmäla till årets Bokens dag. Den är tillhoppa knappt 100 sidor stark och ryms gott i en nått damväska eller manlig innerficka, men dess yttre är välgörande pryddigt och sobert, och dess inre värde

kan tillfredsställa högt ställda anspråk, på vissa punkter de högst ställda. Nyhetslistan blir kort:

Szilágyi—Elg: *Dua rapsodio, novelara kolekto.*

Kr. 2:—

Björn Collinder och John Stenström: *Esperanto, latinets arvtagare, nationalspråkens jämlike.* Svenska Esperanto-Institutets Skriftserie n:r 1. Kr. 1:—

Stellan Engholm: *Malgranda Revuo nr 2.* Kr. 1:—

**DUA RAPSODIO.** Här skulle vi kunna fatta oss kort, eftersom vi redan i förra numret hade tillfälle att anmäla dess ankomst. Vi hälsade den då som en förelöpare till en kommande tiders årliga esperanto-kalender, vilken vi tidigare drömt om att rörelsen skulle kunna åstadkomma, esperantovärlden till uppbyggelse och glädje och världen i övrigt till synlig erinran om ett livligt utnyttjat språk med stora, ja, alla ett språks möjligheter, och en rörelse i samma förnämliga art. Det dröjer kanske innan vi nått till den drömda kalendern, men vad som i år föreligger, ger så många goda prov på esperantos värde som litteraturspråk, att vi inte önska den vara annorlunda. Den kommer att bli en ypperlig julbok och för framtiden en god vän för älskare av esperanto ur olika men alltid goda pennor.

**Svenska Esperanto-Institutets skriftserie nr 1: ESPERANTO — LATINETS ARVTAGARE, NATIONALSPRÅKENS JÄMLIKE.** Här möter oss ett verk på svenska. Det vänder sig alltså inte enbart till esperantisterna, utan till svenskar i allmänhet, men det är vår, esperantisternas, sak den talar. Den har mycket att säga alla, och inte oss minst.

Svenska Esperanto-Institutet anordnade i juni 1943 under namnet "Somera Universitato" en femdagars studiekurs i Lund och Malmö med föreläsningar i skilda ämnen. Enligt samstämmiga uttalanden av de många kursdeltagarna voro samtliga föreläsningar av så stort intresse och värde, att de borde befordras till trycket.

Med anledning härav har Svenska Esperanto-Institutet beslutat starta en skriftserie, som inledes med dessa föreläsningar. Början göres med professor Björn Collinders radioföredrag vid sommaruniversitetets öppnande över ämnet "Ett mellanfolkligt språk" samt läroverksadjunkt John Stenströms två föredrag "Esperanto i kulturspråkens krets" och "Några reflexioner över det 'konstgjorda språket esperanto'".

Då dessa tre föredrag torde vara av värde inte endast för esperantister utan även för andra, som vilja veta vad esperanto är, utges denna skrift på svenska. Om den får ett välvilligt mottagande, komma närmast följande nummer av serien att innehålla övriga föredrag vid sommaruniversitetet på esperanto, d.v.s. i den form de framfördes.

Vad som i detta första häfte bjuds av de två språkmännen är lika nöjsamt som intresseväckande. Man njuter av den logiskt bindande bevisföring, som professor Collinder använder i sin eleganta uppläggning av hjälpspråksfrågan — tillbaka till latinet, skulle man kunna säga, men till den för modernt liv avpassade form av latin, som Zamenhof byggde. Inte mindre njuter man av adjunkten Stenströms effektfulla framförande av esperanto i tävlan med andra språk, evad det gäller enkelhet, klarhet eller välljud.

Häftet bör kunna bli vår bestseller, ty esperantisten kommer inte att nöja sig med att äga ett eget exemplar därav, han kommer att lägga sig till med en samling, ty ingen torde kunna tala bättre för vår sak än dessa två kunniga män, vilkas ord vi med detta häfte ha tillfälle att överbringa till öron och ögon, som vi önska öppna.

**MALGRANDA REVUO.** Denna publikation står mellan de två andra här anmälda i den mening, att, medan *Dua Rapsodio* är helt och hållet litterär och institutets häfte helt står i rörelsens tjänst, Engholms *Malgranda Revuo* arbetar på båda fälten. Vi behöva ej säga att den arbetar bra, ty Engholms namn är en borgen för att endast fullvärdigt släppes fram.

Engholm själv bidrager med en tänkvärd första artikel *Ligo de homoj*, vidare en översättning från ett svenskt manuskript "En flykt", samt ett poem och slutligen en sammanställning av Klubaj taskoj. Dansken Jus-

**Por la libro.**

F. Szilágyi.

Jen fulgo pluvos al la urb' iama,  
jen flor' baraktas en la laf' de l'mondo.  
Nur flustras ni kaj kie la respondo?  
Angore palpas la kareso ama.  
Ĉu vana estus eĉ la paco jama?

Se cindro grizas sur la verda fibro,  
la vivo tamen — kredu — plu ne ĉesos;  
sub nova sun' nin nova varm' karesos  
kaj venkos fort' de l' Vorto, verda vibro!  
Kaj tial, tial — — —  
vin armu por la celo per la Libro!

tesen har en synnerligen trevlig världsomspännande skildring: Papilio, svensken Furuhammar har åtskilligt att säga i sin "Juda amiko". Hrr Szilágyi och Allinger sia båda om framtiden men på högst olika sätt. Vi skola ej avslöja hur.

Köpa vi på bokens dag intet annat, så köpa vi dessa tre böcker och få veta allt och lära känna allt, som vi här endast kunnat antyda.

**Resumo:** La redakcio klarigas por sveda publiko la enhavon kaj la sencon de tiu parto de la esperantomovado, kiun ni nomas "La Tago de la Libro". Oni tuŝas la malfacilaĵojn por la nuna eldonado de esperantaj libroj, ne kaŝante, ke ili ĉijare estas tiel grandaj, ke eble neniu libronovaĵo estos menciita por decembraĵaĵoj. La situacio tamen heliĝis tiel ke la svedaj eldonistoj provis novan streĉon kaj je La Tago estas haveblaj tri libroj ĵus venintaj de la presmaŝinoj. Ne grandaj. Sed enhavoriĉaj. Kaj belaj.

Du estas en esperanto kaj unu en sveda lingvo: Tiu lasta estas numero 1 en nova serio eldonita de Sveda Esperanto-Instituto, al kiu ni alian fojon revenos.

## Konferenco pri La popoloj apud la Balta maro.

### Pacproblemoj.

Aranĝas IEL kaj SEF 5 kaj 6 jan. 1944.

Celo.

La celo de la konferenco estas doni eblecon al reprezentantoj de la landoj ĉirkaŭ la Balta maro publike klarigi la dezirojn kaj esperojn pri la venonta pactempo. Prelegos nur ne-politikistoj, ĉar tiamaniere la konferenco povos pli korekte respeguli la ĝeneralan opinion de la koncerna popolo, do flanke de politikaj aspiroj kaj pretendoj.

Programo.

5 j a n u a r o:

17 h. Interkonatiĝo en konferenca akceptejo, Stokholma universitato, Norrtullsgatan 2.

18 h. Salutvortoj de s-ro E. Malmgren.

Red. Sven Backlund: "La reciproka helpo de la ŝtatoj ĉirkaŭ la Balta maro."

19 h. Prof. Björn Collinder: "Lingvaj problemoj de la Baltmara regiono."

20 h. Komuna te-supeo en apuda restoracio "Margareta-skolan".

6 j a n u a r o:

10 h. Rektoro J. Vilkki, Finnlando: "Nia milito — nia paco."

11 h. S-ino Alide Kuld-Leijder, Estland: "La sorto de Estonio, Latvio kaj Litovio."

12 h. Lunĉo.

14 h. Ing. Fred Turner, Anglujo: "Atlanta deklaro kaj ĝia influo al la packondiĉoj."

15 h. Diskutado.

Esperantistoj, venu multnombre al tiu ĉi konferenco!

**Här går vägen.**

Hjalmar Kihlberg.

Vad vårt lands esperantorörelse just nu behöver är svenska föredrag om det internationella språkets nödvändighet och uppgift. Därigenom kan man hoppas, att nytt intresse för språket ånyo ska kunna väckas; något som är i hög grad behövt, om arbetet ska få ny fart efter det nuvarande krigets avslutning, då med all sannolikhet vårt språk kan få sig uppgifter förelagda i fredens och folkförbrödringens tjänst.

Ett försök i nu nämnd riktning har gjorts i Vingåker, och då detta möjligen kan ge ett uppslag eller instigera någon klubb att göra om försöket, ska här lämnas en kortfattad redogörelse av detsamma:

Ortens lokalavdelning av Arbetarnas Bildnings-Förbund anordnade den 1 och 2 november en föreläsningsserie över ämnet "Några drag ur Europas språkhistoria", omfattande 4 föredrag:

- 1) Europas språkkarta i världskrigets belvsnig.
- 2) Språkstriderna i Norge och Finland. Vad lära de oss?
- 3) Schweiz ett fyrspråkigt land utan språkstrider.
- 4) Europas grundspråk: från latin till esperanto.

Föreläsare var redaktör Sven Backlund, och någon lämpligare person att handhava detta ämne torde svårigen kunna uppbringas. Hela hans föregående verksamhet borgar för en mästertlig uppläggning och behandling av detsamma. Han har sålunda bl. a. under långa tider varit bosatt i flera av Europas kulturcentra: London, Paris, Genève. Under många, många år har han varit tolk i Nationernas Förbund, en uppgift för vilken han måste varit synnerligen lämplig på grund av sin erkänt stora språkbegåvning. Dessutom är han en stor kännare av internationella förhållanden samt varmt intresserad för allt, som svftar mot fred och folkförbrödring. Dessa hans internationella intressen ha också lett därtill, att han blivit en hängiven esperantist, som ser i detta språk ett medel att närma de olika folken till varandra.

Något längre referat av föreläsningarna ska inte här göras. Vare det nog sagt, att föreläsaren gav en mycket intressant redogörelse över Europas språkförhållanden samt slutade med en hänförd appell för esperanto såsom den rätta lösningen av den internationella språkfrågan.

Publiken var stormförtjust; och nu förbereder lokalstyrelsen av ABF en studiecirkel i esperanto.

Här går alltså vägen för oss att få upp intresset för esperanto, och vägen heter **SAMARBETE MED ABF-FÖRENINGARNA**. Dessa erhålla ofta för sin verksamhet anslag av kommunalmedel, varför de kunna anordna föreläsningsserier, vilket våra esperantoföreningar vanligen ej ha råd till. Om respektive orters lokalavdelningar av ABF alltså visa sig villiga att anordna exempelvis ovannämnda föreläsningsserie av redaktör Sven Backlund, så gives härigenom en synnerligen god utgångspunkt för den direkta esperantoundervisningen, vilken orternas esperantoföreningar sedermera kunna taga hand om.

Nämnda föreläsningsserie beställes hos ABF:s Centralbyrå, Barnhusgatan 3, Stockholm.


**Resumo:** S-ro Kihlberg atentigas al la svedaj kluboj ke unu el la prelegserioj de redaktoro Sven Backlund, la iama interpretisto ĉe la Ligo de Nacioj, enhavas la jenajn temojn:

- 1) La lingvokarto de Eŭropo en la lumo de la mond-milito.
- 2) La lingvobataloj en Norvegio kaj Finnlando.
- 3) Svisujo, kvarlingva lando sen lingvobataloj.
- 4) De la latino ĝis esperanto.

S-ro K. konsilas al la kluboj, ke ili instigu la lokajn sekciojn de la Laborista Kleriga Asocio (ABF), ke ili mendu tiun serion por siaj kursplanoj kaj ke la kluboj utiligu la intereson por esp. kiun certe vekos la prelegoj de s-ro Backlund.

**EN RESERADIO**

för 1 kr. och 10 öre eller andra värdefulla vinster kan du vinna, om du skickar 1:10 kr. till Stockholms Esperanto-Förening, postgiro 544 54.



## Pr ed i k o

en Maria-kyrkan en Hälsingborg la Duan Pentekostan tagon 1943 de paroĥestro Gunnar Edberg.

En la nomo de Dio, AMEN.

En la evangelio de la pentekosta tago ni trovas inter aliaj ĉi tiujn vortojn:

**Jesuo diris: Pacon mi lasas al vi; mian pacon mi donas al vi.**

Pri paco parolas do ĉi tiuj vortoj. Kaj kio paco estas, tion devas ja ni svedoj pli bone ol la plimulto da aliaj nacioj kompreni. Nia lando estas hodiaŭ trankvila loĝejo de la paco meze inter la ventegoj de la milito. Kaj pro tio ni devas esti tre dankemaj. Jesuo diras: Mian pacon mi donas al vi. Ĉi tio signifas, ke la paco estas donaco kaj ne io, kion oni mem povas preni al si. Kiel abundan donacon de Dio ni akceptu tiun pacon, kiun ni ĝis nun ĝuis. Neniu povas diri, ke ni atingis ĝin per propraj penadoj. Neniu povas diri, ke ni meritis ĝin. Des pli grave estas ricevi tian ĉielan donacon. Des pli ni devas danki pro ĝi, danki Dion pro ĝi. Ĉar sen ĉi tiu donaco ni ne povis kunveni ĉi tie hodiaŭ. Mi elektis kelkajn vortojn el la Biblio pri la paco, pri tiu paco, kiun la Savanto donas. Ĉi tion mi kompreneble ne faris sen kaŭzo. En la plej dolĉa tempo de la frusomero, en urbo netuŝita per dezertigoj de la milito, en kvieto kaj trankvilo ni ankoraŭ unufoje povis kunveni sub la verda stelo de la esperantismo. Tiaokaze ne estas tro granda postulo, ke ni vere pensu pri ĉi tiu nemeritita favoro kaj sendu sinceran dankon el la koro al nia ĉiela Patro.

Sed mi elektis ĉi tiujn vortojn pri la paco ankaŭ pro aliaj kaŭzoj. Jesuo parolas pri la paco ne nur kiel donaco sed ankaŭ kiel tasko. "Pacon mi lasas al vi", li diras. Ĉi tio signifas, ke estas nia tasko transsendi la mesaĝon pri la paco, prepari vojon por la paco, labori por la paco. Kaj estas ja ĉi tio, kion la esperantismo volas. La esperantomovado ne nur estas lingvomovado. Ĝi estas antaŭ ĉio pacmovado. Esperanto kiel internacia help-lingvo, kiel ĉies dua gepatra lingvo estas nur la ilo, la vojo por atingi la grandan celon: paco, konkordo kaj frateca komuneco inter nacioj kaj individuoj. Ĉi tio estas la animo de la esperantismo, ĉi tio estas la koro de nia movado, kiu batas kaj kiu subtenas ĉian vivon. Ne estas sufiĉe al la esperantismo, ke homoj el diversaj nacioj per komuna lingvo lernas kompreni unu la alian kaj povas interŝanĝi pensojn. Kun ĉi tiuj eblecoj ni volas servi la bonon, servi la popolfratigon. Kaj ni ja scias, ke ĉi tio ankaŭ estas konforme al la intencoj de tiu viro, kiu kreis Esperanton. Lian noblan penson ni nun devas porti pluen. Kaj ĝuste en la nuna tempo ĉi tio havas sian specialan gravecon kaj taskon. Meze en la tempo de la milito ni laboras por la nova mondo de la paco, kiu levigos el la ruinoj. La esperantomovado estas pacpreparo. Kaj tial, amikoj, ni havu altan opinion pri ĉi tiu movado. Tial ni ĝoju partopreni ĉi tiun laboron por konstrui la estontecon. Tial ĉiu en sia loko servu nian movadon kun la plej granda entuziasmo.

Sed ĉi tio havas nun praktikan konsekvencon al ĉiu inter ni en nia ordinara, ĉiutaga vivo, konsekvencon, kiun ni ne devas forgesi. Ĉar mi opinias, ke tiaokaze devas ankaŭ ni provi paciĝi unu kun la alia, ni esperantistoj, kaj, se estos eble, resti pacemaj niaparte kun ankaŭ aliaj homoj. Estas ja alie tre sensece paroli grandajn vortojn pri la graveco de la esperantismo por la mondopaco. Tiaokaze ni reprenos per unu mano tion, kion ni volis doni per la alia. Ekzistas ja insultaj vortoj ankaŭ espe-

rante. Ili eble havas rajton kiel tradukoj, sed alian rajton ili ne havas. Inter esperantistoj ili estas absolute malpermesataj. En nia kunestado ili estu ekskomunikataj, ĉu ne.

Sed estas en ĉi tiu okazo ne nur demando pri la vortoj, kiujn ni parolas. Estas demando pri tio, kio kaŝas sin sub la vortoj. Estas en ĉi tiu okazo laste demando pri la koro, la spirito de ĉiu inter ni esperantistoj. Ĉar estas en ĉi tiu okazo kiel ĉiam: la kvalito de organizo, la kvalito de movado, la rezulto de kunvenoj kaj konferencoj dependas laste de tiuj homoj, kiuj estas membroj de la organizo aŭ movado, kiuj partoprenas la kunvenojn kaj konferencojn, jes, dependas laste de la koro, de la interna sintenado de tiuj homoj. La esperantismo — tio estas ni esperantistoj mem — havas ĉiuj personan parton en nia movado, ni estas ĉiuj persone respondej pri la sorto kaj estonteco de la esperantismo. Tial la vortoj de Jesuo: "Mian pacon mi donas al vi", havas gravan mesaĝon al ni ĉiuj. Ĉi tiuj vortoj montras vojon for de la senfruktaj kampoj de la egoismo; ĉi tiuj vortoj malfermas vojon al novaj konkeroj, novaj venkoj; ĉi tiuj vortoj transmontras al kelkaj aliaj vortoj de la Majstro de Nasaret: "Feliĉaj estas la pacigantoj, ĉar filoj de Dio ili estos nomataj; feliĉaj estas la humilaj, ĉar ili heredos la teron".

Amikoj, ni hodiaŭ kunvenis ĉirkaŭ ĉi tiuj vortoj de nia Savanto: "Pacon mi lasas al vi; mian pacon mi donas al vi". Kaj ĉi tion ili do diru al ni:

**U n u e:** memorigi nin pri tiu paco, kiun ni en nia lando ĝis nun ĝuis, dum la cetera mondo brulas — paco sen propra merito kaj indeco, paco, kiu estas donaco de Dio, paco, kiu ebligis al ni ankoraŭ unufoje kunveni sub la verda stelo de la esperantismo.

**D u e:** memorigi nin pri tiu tasko, kiu estas la originala kaj plej esenca tasko de nia movado: labori por paco, konkordo kaj fratiĝo inter rasoj, nacioj kaj individuoj; kaj entuziasmigi nin al novaj, freŝaj prenoj.

**T r i e:** memorigi nin pri la graveco de nia persona, interna sintenado por la esperanta afero kaj turni niajn okulojn al tiu fonto de la vivo, kiu nomiĝas Jesuo Kristo, nia Savanto.

Ni do zorge atentu tion, pri kio la vortoj de la Sinjoro hodiaŭ volas instrui nin. Tiaokaze ni ekhavas la favoron ekesti veraj esperantistoj. Kaj tiam ni povas havi la certecon, ke nia movado ne estas privata, amata ĉevaleto de kelkaj malmultaj sed ilo en mano de la Plej-alta por krei pli helan kaj pli bonan mondon.

AMEN.

### VETERANO — 70-JARULO.

Veterano tiel de la esperantomovado kiel en la Stokholma klubo esperantista, Hans Andersson, atingos je la 21-a de decembro la aĝon de 70 jaroj. Dum la multaj jaroj li ĉiam fidele vizitis la kunvenojn, eĉ faris tie interesajn paroladojn. Kiam la Sveda Esperanto-Instituto estis fondita Hans Andersson inter la unuaj faris sian superan ekzamenon. Li ankaŭ vizitis kongresojn en fremdaj landoj, lastfoje en Varsovio 1937.

Malgraŭ ke li naskiĝis blinda Hans Andersson akiris al si mirindan mezuron de klereco kaj komuna scio, pro kio liaj amikoj honoras lin per la titolo "profesoro". Ankaŭ bona kantisto de longtempe li kunkantis en ĥoro preĝeja. Sian maljunageton li travivas nun en la trankvilo de "Lammska hemmet" ĉe Adolf Fredriks torg.

La multaj amikoj de Hans Andersson deziras al la 70-jarulo spite al sia blindeco ĉiam bonhumora ĉian bonon kaj feliĉon.

PNn.

### FAMILIA NOTO.

John Christoffersson kaj Linnea Trönlund geedziĝis la 6 novembro 1943. MoRo deziras feliĉon kaj harmonion en la nova hejmo. Same la redakcio.

### Sveda Instruista Esperanto-Federacio (Svenska Lärares Esperanto-Förbund)

Fågelfångaregatan 20  
Telefon 14 93 43

Göteborg V  
Postgiro 3 14 30

**KRISTNASKA LETERO.**

I e en Svedujo, decembro 1943.

Karaj amikoj.

• Maldika neĝotavolo kovras la dormantajn kampojn. Sennombraj glaciaj kristaloj briletas laŭlonge de la branĉeta reto de la nudaj betuloj, kies trunkoj estas blankaj kiel neĝo. La verdaj branĉoj de la abioj estas kiel pudritaj.

Ĉio estas serena, senviva trankvilo. Super mi la vintra ĉielo sin etendas kiel nigra vualo al la nevidebla malproksimo. Antaŭ mi la betonaj blokoj baras la vojon al la najbara lando.

Mi postenas tute sola. La kamaradoj dormas en simpla ligna kabano. Dum du longaj noktaj horoj mi devas marŝi antaŭen kaj malantaŭen.

Nenia soneto estas aŭdata. Ĉio estas plej profunda silento. Mi estas sola kune kun mi mem.

Mi haltas antaŭ la limbarilo kaj tenas la pafilon sub la brako. La bajoneto montras kiel ŝtala fingro rekte antaŭen.

Mi estas sola, sed tamen mi ne estas sola. La pensoj liberigas de la soldata devo kaj flugas al vi, kara Hermann, kiu troviĝas ie sur la batalkampo de la blankhaŭtuloj. Ĉu vi servas en la arbaroj de Polujo? Ĉu viaj okuloj estas plenaj de espero? Ili esprimis tian en Budapeŝto, kiam ni sencele vagadis laŭlonge de la bordo de Danubo. La floroj odoris sur la Margareto-insulo.

Mi memoras vin, kara Georgo. Kiam ni renkontiĝis en Londono, vi estis plena de paca entuziasmo. Multaj jaroj pasis. Ĉu vi batalas en la praarbaroj de Malako?

Mi vidas vian roman kapon, kara Julio. Ni vidis unu la alian en Berno kaj amikiĝis. Via animo estis el fajro. Ĉu via flugmaŝino falegis?

Neniam mi forgesos vian freŝan ridon, kara Jean. En varmeta vespero ni sidis interbabilante en kafejo apud Sejno. Via kredo estis fortega. Vi estis artisto de la vortoj. Via elokventa sincereco konvinkis min. La ligiloj de la amikeco kunligis niajn korojn. Ĉu via ĉarma rido lumigas la rondon de la kamaradoj?

Mi vidas vin ĉiujn, amikoj el ĉiuj partoj de la mondo. Mi renkontis vin hazarde. Poste viaj leteroj rakontis pri vi kaj viaj hejmaj cirkonstancoj.

Subite la sorto detondis la fadenojn, estingis la lumon de la amikeco. La potenculoj ordonis pri milito. La eblecoj de interkomunikado malaperis.

Oficiale la amikoj fariĝis malamikoj. Baldaŭ la kvina milita Kristnasko venos. Kvar jaroj de silento.

Tamen mi ne forgesis vin, Hermann, George, Ivano, Paŭlo, Jean ktp. Mi scias, ke vi ne forgesis min. Mi scias, ke vi konservis la internacian kredon, ke vi ne perdis la esperon, ke vi — kiel mi — sopiras al la tago de la paco, al la tago de la renkontiĝo.

Dum ĉi tiu Kristnasko viaj pensoj flugos kiel la miaj al la amikoj, kiujn vi havis antaŭ la milito, al tiuj kamaradoj, kiuj estis kunbatalantoj kaj samideanoj.

Estu salutataj, karaj amikoj. Via ardanta sopiro estas la sankta fajro, kiu unu tagon sendos la flamojn al la ĉielo, signalante al la turmentita homaro, ke nova epoko ekvenas.

Tiu penso ŝajnas utopia kaj fantazia, sed ni memoru, ke dependas de nia propra agado, kia la estonteco aperos. Venos tago, kiam ni denove povos saluti unu la alian en amika rondo, kiam ni kune planos la rekonstruon de la mondo sur bazo de bonvolo, amo kaj interkompreno ...

La du horoj forflugis. Mia kamarado venas. Liaj paŝoj vekas mian atenton. Denove la pensoj estas katenataj al la soldata devo.

Via amiko Einar Dahl

**Svenska Esperanto-Tidningens prenumerationspris**

för år 1944 blir 4:— kronor. Med detta nummer följer en postgiroblankett och vi be alla förutvarande prenumeranter, att använda den vid prenumerationsförnyande och redan nu sända in den.

Till SEF direkt anslutna medlemmar böra ej prenumerera på tidningen, då avgiften för tidningen ingår i medlemsavgiften kr. 7:50.

**För julen!**

Julkort med esperantotext .....	0:10
Jul- och nyårskort med esperantotext .....	0:10
Miniatyr-esperantoflaggor för julgranen eller för julbordet. Mycket dekorativa .....	0:08
Brickor till d:o som fot .....	0:03

**För Bokens dag:**

50 jarojn kun Paul Nylén .....	4:—
D:o, bibliofilupplaga .....	12:—
Gösta Berlings saga .... häft..	6:—, inb...7:50
Sveda Antologio .....	häft. 8:50, inb. 10:—
Maljunulo migras — Venĝo av S. Engholm	1:50

Till ovanst. priser tillägg 15 % för oms. o. porto.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

Fack 698, Stockholm 1. Postgiro 578.

**EL BULGARUJO .**

Kiel aldonon al Hungara Heroldo ni ricevis "Revuo-Bulteno pri la esperanto movado en Bulgarujo". La lastveninta numero komencas per nekrologo pri la reĝo Boris III:a. — La malgranda kvarpaĝa numero estas entute flama alvoko al la bulgaraj esperantistoj, ke ili revivigu la movadon kaj metu kiel instigon la bildon de la antaŭ tri jaroj por ĉiam foririnta samideano docento de geografio Gunĉo St. Gunĉo, la agema fondinto de la esperanta oficejo en Pleven, centro por la iama esperanto-propagando en Bulgarujo.

*Belan, gajan Kristnaskon, pacan novan jaron deziras al ĉiu samideano kaj amiko en Svedlando kaj en la tuta mondo*

Rose kaj Ferenc Szilágyi (Fristad).

*Geamikoj!*

*Dankon pro floroj kaj dolĉaĵoj al malsanulejo! Kun kristnaskaj sentoj salutas la feliĉajn svedojn kaj suferantajn eksterlandajn samideanojn, esperante pri pacoporta Novjaro*

Tiberio Morariu

Stockholm, Tegelbacken, dec. 1942.

*Feliĉan Kristfeston kaj bonan novan jaron deziras al ĉiuj*

La redakcio.

**Favorabono de Sveda Esperanto-Gazeto.**

Samideanoj en Finnlando povas aboni nian gazeton "La Espero" ankaŭ por la jaro 1944 pagante sumon fmk 25:— al la poŝtgirokonto (postsiirtotili) n:o 60253 (de s-ro Joel Vilkki, Somero) en sia proksima poŝtofiĉejo.

**Abono de Malgranda Revuo.**

La nova, pure esperanta kulturgazeto MALGRANDA REVUO estas abonebla ankaŭ de finnaj samideanoj. Por ricevi du unuajn numerojn, ili pagu al la poŝtgirokonto n-o 60253 (de s-ro Joel Vilkki, Somero) sumon fmk 25:— en sia proksima poŝtofiĉejo.

# SEF Spalten.

La estraro decidis en marto eldoni matrikulon, kiu enhavos nomojn kaj adresojn de ĉiuj membroj (klubaj kaj rektaj) grupigitaj laŭ kluboj kaj lokoj. La nura kondiĉo estas ke la ekonomio permesos. La matrikulo estos stencilita kaj elsendata al kluboj, distriktaĵoj funkciantoj kaj rektaj membroj. Ĝi montros la membraron dum 19. sed la estraranoj estos indikataj laŭ novaj matrikulkartoj por 1944.

\*

Nia kartoteko montras ke dum 1943 32 kluboj raportis pri 744 membroj. Kun la 106 rektaj membroj tio faras la membronombron 850. Malmö preterpasis Stockholm 101 kontraŭ 87. Kiu gajnos jarfine? Stopu la truojn en la matrikulo!

\*

Ĉiu membro nun ricevas memorliston pri 1944. Tie oni ricevas respondon de diversaj demandoj farataj de membroj. Kien mi turnu min? Kiu prizorgas tion? Kiam tio devas esti preta? Konservu kaj uzu tiun liston en la esperantolaboro.

\*

Krom Svenska Esperanto-Tidningen ni dum la jaro ricevis sekvaĵajn gazetojn kaj revuojn: Laborista Esperantisto (SLEA), Esperanto Internacia (IEL), Svisa Espero, Hungara Heroldo, Amerika Esperantisto, Nia Parolilo (Göteborg), La Folio (Malmö), ESTO (Stockholm). Ni esprimas nian plej sinceran dankon al la eldonantoj.  
S a l e x.

## FRAN FÖRBUNDSKASSÖREN.

### En julklapp till SEF.

En hel del esperantistoj ha redan sänt oss julklappar och vi vänta ytterligare gåvor till vårt postgirokonto 20 12. Denna insamling avslutas med utgången av innevarande år. Liksom föregående år komma vi att dela ut några bokpris som en liten uppmuntran bland dem som skänkt minst 2:— kr. I februariumret komma vi att lämna fullständig redovisning av influtna medel samt uppgift på vilka som erhållit bokprisen.

Birger Gerdman.

## Al malnovaj membroj de Internacia Esperanto-Ligo.

En septembro mi dissendis 200 varbajn kartojn al malnovaj membroj de IEL. La rezulto de tiu varbado ĝis nun estis ke 16 gesamideanoj realiĝis al nia internacia organizo. Ĉijare pagis 133 svedaj membroj kotizon al IEL. Pasintjare pagis 145. Kiam mi estis sendinta mian alvokon, mi estis tiom optimista, ke mi skribis al la sekretario de IEL sro Goldsmith, ke li sendu almenaŭ tiom da jarlibroj kiom pasintjare al mi por resendo al la svedaj membroj. Kaj mi ricevis respondon ke li jam faris tion. Ĝis nun mi tamen ricevis nur 8 jarlibrojn de 1943, ĉar la vojo inter Anglujo kaj Svedujo estas nun longa kaj malfacila, sed la jarlibroj certe iam venos.

Do svedaj gesamideanoj, malnovaj membroj de IEL, pagu vian ĉijaran kotizon — estas eta elspezo por vi, sed granda helpo al nia internacia organizo en malfacila tempo.

Antaŭan dankon  
via Karl Wästfelt  
Ĉefdelegito de IEL en Svedujo.

## Tri bonaj, malkaraj libroj:

Selma Lagerlöf: <i>La Ringo de la Generalo.</i> (Löfvensköldska ringen)	2:—
G. Henriksson: <i>Per motorciklo tra tri landoj</i>	0:75
Stellan Engholm: <i>Al Torento</i>	1:20

För oms. och porto 15 % tillägg.  
Frimärken mottagas som likvid.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO  
Fack 698, Stockholm 1.

## OMBUDSMANNEN.

Redaktör Morariu har efter sin sjukdom avflyttat till Stockholm (adress Tegelbacken) och återtagit sitt arbete som ombudsman. — Den 3/11 talade hr Morariu i Stockholms Esp.-Förening om "Vistelse på ett svenskt sjukhus" och den 10/11 berättade han rumänska anek-



doter för föreningens medl. — 18/11 höll han föredrag i läroverket i Karlstad och esp.klubben där. Den 19/11 höll han föredrag i Komm. mellanskolan i Kil och den 20/11 provlektion vid KFUM:s ungdomsafton. Den 21—25/11 är att anteckna föredrag i Åmål, Grums, Molkom, Skoghäll och Munkfors samt att han stack emellan med en provlektion i Folkskollärarnas klubb i Karlstad, av vilket besök han väntar sig stora resultat. — Från Grums kommer dagens bild av en esperantoutställning i Folkets hus där. Hans program upptager sedan föreläsningar i Hagfors, Råda, Kyrkheden-Ekshärad och Åmotfors.

Hans rapport innehåller starkt och tacksamt beröm för folkskollärare G. R. Johansson i Karlstad för dennes ypperliga hjälp i arbetet.

Ombudsmannen kommer att efter nyår besöka Dalarna för att sedan fortsätta norrut.

## DALEKARLIA DISTRIKTO KUNVENAS.

Dalekarliaj geesperantistoj el Krylbo, Avesta, Smedjebacken, Vikmanshyttan, Säter kaj Borlänge kuniĝis dimanĉe la 17-an de oktobro al distrikta kunveno en Säter. Oni diskutadis diversajn eblecojn por Esperanta agitado kaj raportis pri siaj spertoj en kluboj kaj studrondoj. Komuna esperanta klubo por Säter, Vikmanshyttan kaj Hedemora eble estos baldaŭ fondata. Pluraj partoprenantoj rakontis dum la kunveno pri siaj spertoj en internacia korespondado kaj montris interesajn bildkartojn ricevitajn! S-ano Bengtsson, Krylbo, ricevis eĉ lastatempe leteron el Argentino, en kiu lando oni speciale dum lastaj jaroj montras grandan intereson por Svedlando.

## VERDA RONDO.

Boråsklubben Verda rondo har en synnerligen glädjande nyhet att komma med: esperanto har blivit infört som frivilligt ämne vid Fristads folkhögskola.

På förslag av klubben beslöt Älvsborgsdistriktet vid sitt årsmöte i april göra en framstöt i saken, och resultatet har just i dagarna blivit klart. Det har inte nåtts utan ett idogt arbete. Det var som man förstår en hel del motstånd att övervinna, men genom skrivelser och personliga besök hos och samtal med styrelseledamöter och framför allt med god hjälp av folkhögskolans rektor Karl Holmquist har det lyckats. Lärare är d:r F. Szilágyi, som under höst- och vårterminerna blir bosatt vid skolan. Det är anledning att tro, att åtskilliga duktiga esperantister komma att vinnas bland den elit av landsbygdens ungdom, som är samlad vid skolan. Saken är att notera som en verkligt stor framgång för vår rörelse.

Verda rondo har inte, som någon uttryckte farhågor för vid kongressen i fjol, "brutit nacken av sig" genom

anordningarna då. Tvärtom betydde kongressen för arrangören en stimulans och uppräckning. Årets möten ha haft en anslutning, som varit större för varje gång, stämningen har varit den bästa, alla ha velat bidra till programmen, och klubbens tioårsjubileum, som firas den 5 december, motses med intresse och stora förväntningar.

Även utifrån har klubben rönt god hjälp. Vid höstens första programmöte bidrog sålunda en av stadens främsta teateramatörer, hr Eric Andrén, "Hamsterlund", med ett utmärkt program, i vilket en förträfflig monolog om esperanto givetvis blev mest uppskattad. Själv trivdes han så bra, att han lovat komma tillbaka och medverka vid jubileumsfesten. Nyligen har klubben haft nöjet ta mot sin hittills största donation. Det är disponent Hugo Ferlin, som står för den, en oljemålning av den kände konstnären Manfred Flyckt. Tavlan är en av konstnärens bästa och har varit med på flera av de utställningar, då han velat visa sin konst. Klubben kommer att sätta upp den som vinst i ett lotteri och får på det sättet en oväntad propagandafond för de kommande kurserna.

A propos kurser har Verda rondo två nybörjarkurser i gång under hösten. Båda kurserna ha fått en relativt god anslutning. Som särskilt anmärkningsvärt kan påpekas, att en av kurserna är anordnad för ungdomar i 10—14-årsåldern. Ett 15-tal är med. Något som bör tas upp på andra håll. I dagarna börjar en esperantokurs vid Västeråsens sanatorium med likaledes ett 15-tal deltagare.

Ungdomsrådet i Borås håller just på att ge ut en broschyr, avsedd att ge ungdomen maningar och råd för fritidens användning. Givetvis har boråsklubben sett till att esperanto är med!

**Resumo:** La esp.-klubo Verda Rondo en Borås (Vestrogotio) fanfaronas prave pri tio, ke oni sukcesis starigi esp.-kursojn ĉe la popola altlernejo en Fristad krom du kursojn en la hejma urbo kaj unu ĉe la sanatorio de Västeråsen. — La eksteruloj observas la klubon. Industria moŝto sro Hugo Ferlin donacis al la klubo altvaloran pentraĵon kaj lerta teatro-amatoro Eric Andrén vizitas ofte la kunvenojn kaj helpas je la programoj. La komunuma konsilantaro por la junuloj distribuas laŭ propono de la klubo sciigojn pri la esperanta laboro en sia broŝuro pri rekomendindaj libertemp-okupoj.

## SVEDA KRONIKO

### La Kabano

somerdomo de la stokholmaj esperantistoj, por la somero 1943 povis registri 113 vizitojn kaj 30 tranoktojn. Tio nepre devas esti la fundo de la valo, kaj venontjare la esperantista vivo en la somerdomo devos multe plivigliĝi, se estos ia senco konservi la hejmon.

S a l e x.

**MALMÖ.** Inter la aŭtunaj kunvenoj la Kolbasvespero la 30-an de okt. kaj la Demandkonkurso la 3-an de nov. estas la plej menciindaj.

La komitatanoj por la kolbasvespero sciis bone aranĝi la feston. La studhejmon ili ornamis tiel, ke ni sentis nin kiel gastoj en la fama gastejo "La Blanka Ĉevalo". Dum la manĝado kaj kaftrinkado kiu daŭris la tutan vesperon ni kantis, kaj la gastigantoj spritadis. La sidlokaj kartoj estis vere lerte preparitaj, ĉar helpe de diversaj bildoj sur ĉiu karto, oni facile trovis sian sidlokon. Kanto kaj muziko faris belan kadron je la festo. En la Demandkonkurso partoprenis la permanentaj cirkloj de K.S.M.: "La Verda Oko", "La Verda Ringo", "Harmonio" kaj "Daŭrigo". Tri anoj el ĉiu cirklo partoprenis, kaj s-ro Wilhelm Johansson gvidis la konkurson. Krome estis montritaj lumbildoj de la Hälsingborga kongreso kaj ege belaj kolorigitaj fotografaĵoj de diversaj floroj.

H-dur.

**Grupo Esperantista de STOCKHOLM.** Dum la pasinta monato ni kunvenis ĉiun merkredon kiel ordinare. La 3-an de nov. la Sindiko rakontis al ni pri sia restado en

sveda malsanulejo kaj Sigvard Håkansson pri gajaj epizodoj dum militservo. La 10-an ni havis traktojn kaj studservon. Red. Nylén gvidis la studojn. La 17-an d-ro Szilágyi interese prelegis pri la evoluo de esperanto. La 24-an fraŭlino Ella Nilson rakontis pri vojaĝoj kaj fraŭlino Maud Ekberg kaj s-ro Philip Pelz plenigis la vesperon per riĉa kaj belega koncertprogramo — piano, violonĉelo kaj kanto.

Pri la loterio de la grupo ni povas raporti, ke ĝis la 24-a de novembro ni vendis 675 lotojn.

Dum decembro ni festos Luĉion la 8-an kaj la tagon de la libro la 15-an. La estraro esperas ke multaj membroj tiam trovos la vojon al la klubejo: Luntmakaregatan 15. Kunprenu konatojn kaj alvoku ĉiujn esperantistojn viziti la merkredajn kunvenojn. Tg.

## LINGVAJ DEMANDOJ.

### Kiam och tiam

bereda ofta nybörjare i esperanto svårigheter. Skall jag översätta "då" med kiam eller med tiam? Då (tiam) är adverb. När? (Kiam?) är adverb. Då, när (kiam) är konjunktion. Det gäller alltså att skilja på adverb och konjunktion. Ett adverb är en bestämmelse till ett verb, ett adjektiv eller ett annat adverb och får alltid en viss tonvikt i satsen. (Obs, att alla ti-ord äro betonade). En konjunktion däremot fungerar endast som förmedlare mellan ord eller satser (konjungere = förena) och har alltså en underordnad ställning i jämförelse med adverb. Den har ej tonvikt.

"När" heter alltid kiam på esperanto, både då det är adverb (det frågande och betonade när?) och då det är konjunktion. I de fall, då jag kan utbyta "då" mot "när" heter "då" alltså kiam. Exempel: När var du i Italien? Kiam vi estis en Italujo? (Kiam adverb.) Jag var i Italien, då (när) du var i Frankrike. Mi estis en Italujo, kiam vi estis en Francujo (kiam konjunktion). Då var du där tillsammans med din bror. Tiam vi estis tie kune kun via frato. (Tiam alltid adverb).

Ejn.

Det har uttryckts en önskan om "lingva angulo", och härpå vill red. svara, att så fort en språkfråga kommer in till red., så uppstår vår spalt "Lingvaj demandoj". Red. hälsar sådana frågor välkomna, ty vi ha alltid tillgång till goda experter, som säkert kunna klara upp edra problem. Red.

### Ur ett autografblock.

SEF:s ombudsman har under sina många och långa resor träffat samman med många män i framskjuten ställning och ibland har han lyckats avlocka dem ett skriftligt uttalande till sin autografsamling. — Låt oss för dagen få återge två sådana som vi på måfå slå upp då vi bläddrat i den innehållsrika boken.

### Biskop Edv. Rodhe i Lund skriver:

Fred, försonlighet och förståelse folken emellan är en tvingande nödvändighet och ett efterlängtat mål, som aldrig kan eller får släppas ur sikte. För egen del tror jag, att kristen tro och kristen moral äro härför oundgängliga. Alla medel för att nå sådan förståelse folken emellan måste emellertid tagas i bruk. Kan esperanto föra hän mot målet måste detta väcka glädje hos var och en, som pinas och vändas av det nuvarande hatet och väntar på förståelse folken emellan.

Lund 9 april 1943.

Edv. Rodhe

Biskop i Lund

**Traduko:** Paco, pardonemo kaj interkompreno inter la popoloj estas deviga neceso kaj sopirata celo, kiun ni neniam povas aŭ rajtas ellasi el nia vido. Propraparte mi kredas, ke kristana kredo kaj kristana moralo estas nepre bezonataj por tio. Ĉiujn rimedojn por atingi tian interkomprenon inter la popoloj oni ja devas uzi. Se esperanto povas konduki al la celo, ĉiu devas ĝoji, kiu estas turmentita kaj angoras pro la nuna malamo kaj kiu atendas komprenon inter la popoloj.

**Redaktör Sven Backlund:**

Jag tror, att varje erfaren internationell tolk är på det klara med att förr eller senare ett internationellt hjälpspråk är oundgängligt. Oundgängligt är för varje statsman att framträda på sitt modersmål. Att i det internationella samlivet de mindre nationernas företrädare (frånsett schweizare och irländare samt delvis belgare) varit förhindrade att göra detta, har hindrat deras utveckling till européer och statsmän — detta till Europas olycka. En svensk skall tala svenska med främmande statsmän. Så att varje svensk vet vad han säger och vad han förpliktar oss till. Genom förmedling av ett hjälpspråk skall det översättas till de övriga folkens modersmål, så att envar europé vet vad Sverige och svenskarna förplikta sig till.

Jag ser ingen anledning varför inte esperanto skulle erkännas som officiellt hjälpspråk.

Som europé och demokrat måste man då se till att detta språk blir envars egendom. Det sker bäst genom att esperanto införes vid sidan av modersmålet i Europas alla skolor som obligatoriskt undervisningsämne.

Björkås i midsommartid 1943.

Sven Backlund.

**Traduko:** Mi kredas, ke ĉiu sperta internacia interpretisto bone komprenas, ke internacia helplingvo estas nepre necesa pli malpli baldaŭ. Nepre necese estas, ke ĉiu ŝtatrepresentanto parolu en sia gepatra lingvo. En la internacia kunvivado la reprezentantoj de la malgrandaj nacioj (krom la svisoj, la irländanoj kaj parte la belgoj) ne rajtas fari tion, kaj tio malhelpis ilian evoluon al eŭropeoj kaj al ŝtatrepresentantoj — kio estis fatala por Eŭropo. Svedo devas paroli svede kun fremdaj ŝtatestoj. Por ke ĉiuj sciu kion li diris kaj kiamaniere li promese ligis nin. Pere de helplingvo lia parolado devas esti tradukita en la gepatran lingvon de la ceteraj nacioj, por ke ĉiu eŭropeo sciu, kiel Svedlando kaj la svedoj promese ligis sin.

Mi ne vidas kaŭzon kial esperanto ne estus aprobata kiel oficiala helplingvo.

Kiel eŭropeo kaj demokrato oni do devas provi fari tiun lingvon ĉies posedaĵo. Tion oni plejbone faros enigante esperanton apude de la gepatra lingvo en ĉiujn lernejojn de Eŭropo kiel devigan instrufakon.

## LIBROJ — GAZETOJ

kaj aliaj eldonaĵoj.

**SERIAJ KAJEROJ.**

Sveda Esperanto-Instituto decidis eldoni serion de kajeroj pri siaj laboroj kaj oni komencis per preso de la prelegoj je la somera universitato, kiun la instituto aranĝis dum junio 1943 en Lund—Malmö.

La unua kajero nun aperis enhavante la enkondukan prelegon de profesoro Björn Collinder "Internacia lingvo" kaj du prelegojn de s-ro John Stenström: "Esperanto en la rondo de la kulturlingvoj" kaj "Kelkaj pripensoj je la "artefarita lingvo".

Ĉiuj tri prelegoj estas en la kajero donitaj en sveda lingvo, ĉar la sveda movado urĝe bezonas propagandilon por la laboro inter la intelektuloj — tasko por kiu la tri elegante faritaj prelegoj estas konsiderataj tre taŭgaj.

Per ne-kontraŭ-direbla logiko prof. Collinder en sia prelego montras la neceson de internacia helplingvo kaj kiel ĝi gvidas al la postulo: returnen al la latino! la iama eŭropea parol- kaj skriblingvo de ĉiu intelektulo en nia mondparto. Tamen ne returnen al la latino en ĝia malnova formo sed al la latino en la formo, kiun la genio de dr Zamenhof donis al la homaro.

S-ro Stenström metas esperanton apuden de aliaj kulturlingvoj kaj montras tre spirite kiel bone esperanto konkuras kun ili laŭ diversaj vidpunktoj: klareco, simplereco kaj beleco. Li volas forŝovi el la esperantistaro ĉiun senton de malsupereco je nia lingvo. Li sukcesis.

Aĉetebla ĉe Eldona Societo Esperanto, Fack 698, Stockholm 1. Prezo 1 kr.

**Svenska Esperanto-Tidningen****La Espero**

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet

Postadr.: Box 698, Stockholm 1.

Redaktör: Eva Julin, Gps I a, Sthlm.

Ansvarig utgivare: W. Wahlund.

Prenumerationspris Från 1943: helt år kr. 4:— . Lösnummer 0:35. Utkommer en gång i månaden.

Annonspris: 20 öre pr mm. Korrespondensannons: 1:50.

Expedition: Förlagsföreningen Esperanto, Sveavägen 98, Stockholm. Tel. 31 65 01. Postgiro 578.

**SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET** (Sveda Esperanto-Federacio), Tegelbacken, Stockholm C. Tel. 20 00 43. Postgiro 20 12.

Avgiften i SEF: Direkt anslutna medlemmar erlägga 7:50 kr. pr år och erhålla tidningen gratis. Föreningar erlägga för varje medlem en årlig avgift av 2:— kr. Varje ansluten förening erhåller ett exemplar av tidningen gratis.

**FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO u. p. a.**, postadress: Box 698, Stockholm. (Expedition: Sveavägen 98.) Tel. 31 65 01. (Förlagschefen: 10 53 27). Postgiro: 578. (Böcker, tidningar, korrespondenskurser o.s.v.).

**SVENSKA ESPERANTO-INSTITUTET**, Tegelbacken, Stockholm. Postgiro 5 15 11.

**INTERNACIA ESPERANTO LIGO — IEL** (Sveda Teritorio): Cefdelegito Karl Wästfelt, Cedergrensvägen 27, Stockholm 32. Poŝtĉeka konto 15 12 88. Kotizoj: Membro kun jarlibro kr. 3:—; Membro-Abonanto 8:—; Membro-Subtenanto 20:—; Patrono 80:—.

**MALGRANDA REVUO** (nro 1 kaj nro 2), eldonitaj de Stellan Engholm, Ludvika, Svedujo, estas la komenco de nova gazeto tute en esperanto. Sro Engholm volas kolekti ĉirkaŭ tiu gazeto esperantoverkistojn interesitajn je lingvaj, movadaj kaj literaturaj demandoj, kaj li planas ke la gazeto venos ĉiun trian monaton.

La du jam eldonitaj numeroj donas tre bonan legadon al ni ĉiuj, kaj ĝi venas kiel kuraĝa kuriero kun sciigo pri nova tempo, kiam la debatoj pri grandaj kaj malgrandaj problemoj denove povas libere flugi inter la kvar anguloj de la mondo pere de nia lingvo.

La du numeroj estas haveblaj ĉe la eldonisto (Stellan Engholm, Solgatan 9, Ludvika. Postgiro 26 80 23). Prezo por 1 numero estas 1:— kr.

**KORESPONDADO.**

**S-ro Vasil Cocev**, str Ljulin 38, Sofia, Bulgarujo, deziras korespondi kun gesamideanoj el ĉiu lando. Interŝanĝas volonte esp. versaĵojn.

**S-ro Joze Louis Navaro Cano**, Molino de Viento 2, 1d, Madrid. Interŝanĝas poŝtmarkojn. Interesuloj skribu unue pri kondiĉoj.

**S-ro Oscar Juhlin**, Hamburgsund, Svedujo, deziras korespondi kun ĉiuj landoj.

**S-ro Domingo Pérez Guasp**, Route de Foix, Restaurant Builles, Tarascon-sur-Ariège (Ariege, Francio). Lia anonco aperis en La Espero antaŭ kelka tempo kaj li sciigas ke li ricevis respondon de kvin svedaj gesamideanoj. Nun li demandas, ĉu estas gesvedoj kiuj deziras korespondi kun gefrancoj. Ili havas Korespond-Servon, kaj oni menciuj specialajn dezirojn pri temo ktp.

**Fraŭlino Jeane Dedieu**, 23 rue Victor Hugo, Prades, (Pyr.Or.), Francio, volas havi sciigojn pri grupoj de kristanaj esperantistoj (KELI).

Mi deziras leteron aŭ poŝtkarton stampitan per la speciala stampo uzata dum la SAT-kongreso 1928. Mi kolektas ankaŭ ex-libris-markojn kaj estus ĝoja ricevi kelkajn de ĉiu kiu havas. Menciuj kion vi deziras rekompence de sama valoro. S. W. Ahlm, Pontonjargatan 33, III, Stockholm, Svedujo.

